
# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

numero 259 (26) - kvina epoko - decembro 1988

- Pier Giorgio Soranzo atinginte la Naturan Floron, legas la premiitan poemon.

- Pri la 7a Internacia Literatura Forumo, 28aj Internaciaj Floraj Ludoj kaj omaĝo al nia pioniro Prof. Delfí Dalmau, legu sur paĝoj 3a, 4a kaj 5a.



**ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO/KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO** (Enregistrita far la "Generalitat de Catalunya" en la unua Sekcio je n-ro 5785), Apartat de Correus, 290, 08200 Sabadell, Catalunya/Katalunio, telefonnumero (93) 716 36 33.

**KOTIZOJ POR LA JARO 1988:** Individua Abonanta Membro 1600 p-toj; Individua Subtenanta Membro 3200 p-toj; Individua Dumviva Membro 32.000 p-toj; Kolektiva Membro 3200 p-toj.

**BANKO:** Caixa de Pensions "La Caixa". Agència 461. Pintor Vila Cinca, 08208 - Sabadell, Kontonumero 550-53.

**PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto:** Jordi Carbonell i Pinyol; **Vicprezidanto:** Maria Garcés i Coll; **Ĝenerala Sekretario:** Llibert Puig i Gandia, Apartat 290, tel. 716 36 33. 08200 Sabadell; **Kasisto:** Hèctor Alòs i Font: **Komitatanoj:** Josep Mª Serrano, Josep Franquesa, Bartomeu Costa, Narcís Fluvià, Joan R. Guiñón, Ĝirona Espero, E-Grupo "C.E. Puigcastellar".

**KONTROLA KOMISIONO:** Tomàs Alberich; Ricard Jordana; Òscar Puig.

**KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:**

**PREZIDANTO:** Gabriel Mora i Arana, Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Manuel Casanoves i Casals, Bernard Golden, Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Giorgio Silfer.

**SEKRETARIO:** Joan Ramon Guiñón i Roset.

**JURIO POR LA 28aj INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ en la jaro 1988a PREZIDANTO:** Gabriel Mora i Arana, Perla Ari Martinelli, Jordi Carbonell i Pinyol, Manuel Casanoves i Casals, Salvador Gumà i Clavell, Miguel Gutiérrez Adúriz. **SEKRETARIO:** Joan Ramón Guiñón i Roset.

**FLORLUDAJ MAJSTROJ:** Clarence BICKNELL (3aj IFL, Olot, 1913), Artur DOMÈNECH i MAS (6aj IFL, Reus, 1916), Josep GRAU i CASAS (6aj IFL, Reus, 1916), Marian SOLÀ i MONTSERRAT (6aj IFL, Reus, 1916), Josep VENTURA i FREIXAS (8aj IFL, Girona, 1921), Jaume GRAU i CASAS (9aj IFL, Manresa, 1923), Bernard GOLDEN (20aj IFL, Vilanova i La Geltrú, 1980), Giorgio SILFER (24aj IFL, Olot, 1984)

**PEDAGOGIA KOMISONO:** Manel Marqués, Abel Montagut, Josep Tordera, Joan Torres, Lluis de Yzaguirre.

**VORTARA KOMISIONO: Sekretario:** Jordi Carbonell, Avda. del Paral·lel, 96-6è. Tel. 329 24 81 - 241 94 11, 08015 Barcelona.

**KOLEKTIVAJ MEMBROJ:Centre d'Esperanto Sabadell,** Apartat,407, Papa Pius XI, 130. Tel. (93) 716 36 33, 08200 Sabadell; **Centre d'Estudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto-Grupo** St.Gervasi, 45, 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); **Centre Excursionista Puigcastellar/ Esperanto-Grupo,** St.Josep, 20, 08922 Sta.Coloma de Gramenet (Barcelonès); **Club d'Amics de la Unesco de Catalunya/Departament d'Esperanto,** Mallorca, 207 - pral. Tel. (93) 253 95 07, 08036 Barcelona;**Esperanto-Fako "Institut de Batxillerat",** Camí Reial València, 08860 Castelldefels (Baix Llobregat); **Esperanto-Fako "S.C. Joventut Terrassenca",** St.Francesc, 52, 08221 Terrassa (Vallès Occidental); **Esperanto-Grupo Castelldefels,** A. Einstein 1, 1.3,esc.B, 08860 Castelldefels (Baix Llobregat); **Esperanto-Grupo "Jozefo Anglés",** Apartat 336, 08190 Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), **Firma Tero,Esperanto-Fako Centre Comarcal Lleidatà,** Gran Via, 592, 08007 Barcelona; **Grup Esperantista Sant Pau d'Ordal,** Dr. Zamenhof, 12, Tel. 899 30 03, 08739 Sant Pau d'Ordal. **Ĝirona Espero,** Apartat, 509, 17080 Girona: **Hispana Esperanto-Fervojista Asocio** ĉe Stacidomo Sans Barcelona.

Dipòsit Legal: B-27 362-1982 **Presita ĉe Ràpid Graf Tel. 725.5091 - Sabadell**

### KOMARKAJ DELEGITOJ

**Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf:** Joan Inglada i Roig. Sant Magí, 20. 3r. Tel. (93) 893 71 76 - 08800 - Vilanova i la Geltrú (Garraf).

**Garrotxa, Ripollès:** Joan Torres i Nalda. Escola Llar, Ctra. de la Canya s/n. Tel. (972) 26 38 29 - 17800 - Olot (Garrotxa).

**Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La Selva:** Ĝirona Espero, Apartat - 509, 17080 - Girona (Gironès).

**Tarragonès, Alt Camp, Baix Camp:** Josep Mª Serrano. Edifici Europa B-2-1 (St. Pere i St. Pau). Tel. (977) 21 89 41 - 43007 - Tarragona (Tarragonès).

**Baix Ebre, Montsià:** Josep Mª Altadill. Berenguer IV, 23. Tel. (977) 44 20 09 - 43500-Tortosa (Baix Ebre).

**Catalunya Nord:** Joan Fernàndez. 21 rue Henri Matisse. F-66000-Perpinyà (Rosselló).

# FONDAĴOJ

PREMIO "PETRO NUEZ"

| | |
|---|---|
| ĝis 30.4.88 ...... | 226.500 |
| Ludoviko Yzaguirre | 8.000 |
| Maro ..... | 1.000 |
| GET ..... | 1.000 |
| M.Coll ..... | 1.000 |
| T.Miralles ..... | 500 |

FONDAĴO "MONUMENTO SABADELL"


| | |
|---|---|
| ĝis 31.8.88 ..... | 8.000 |
| Pere M.Martin ..... | 1.500 |
| Carme Cánovas ..... | 1.000 |

FONDAĴO "KOMPUTILO"

| | |
|---|---|
| ĝis 30.10.88 ..... | 1.700 |

SUBTENANTAJ MEMBROJ

Estas tiu kategorio de membro kiu pagas jarkotizon de 3.200 p-toj kaj per ĝi helpas la tutan agadon de nia Asocio.Se suficaj membroj aliĝus al tiu ĉi kategorio ni povus lanĉi novajn projektojn kaj entute prestiĝigi nian movadon.Ne heżitu kaj fariĝu subtenanta membro por 1989.Ni antaŭdankas vian kunlaboremon!



Per la moderna murpentraĵo en la Avenuo Zamenhof de Sabadell,la Plenumkomitato de KEA deziras al siaj membroj kaj legantoj

# FELIĈAN 1989!

Ni deziras resti ĉe la rando de la prudento,evitante la tenton troiĝi kiel kutime faras la esperantistoj pri siaj propraj aranĝoj kaj mi ne komprenas kial:ĉar la movadanoj kiuj legas la raportojn bone scias la veron kaj la ceteraj kiuj neniam legos ilin,ne eblos konscii pri eventuala troiĝo.
La ĉi-supra aranĝo estis fakte internacia kaj pri tio ni tute ne troigas,unue ĉar la organiza Asocio estis la Kooperativo de Literatura Foiro kaj due ĉar inter la 78 partoprenantoj,10 el ili venis el Italio,Danio,Britio kaj Belgio. KEA.surloka kunorganizanto,celis ke la aranĝo fariĝu kvazaŭ Kongreso kaj la preparita programo tion esperigis,sed ĝi restis duonvoje se temas pri aliĝintoj.La kotizo estis kvazaŭ simbola,do neniel timiga: kio do la homojn timigis?.Estus bone legi la opiniojn de la membroj pri la ĵus starigita demando,sed ĉu ili kuraĝos skribi leteteron aŭ ili simple silentos kiel kutime?



# RAPORTO Pri

## 7a Internacia Literatura Forumo
## 28aj I F L
## 1a NOVEMBRO

La Forumo tamen plejparte sukcesis ĉar ĉiuj prelegoj pri minoritataj literaturoj okazis-escepte de tiu pri la okcitana-;la Floraj Ludoj okazis kun granda partopreno denove en la prestiĝa salono de Cento; tre kontentige disvolviĝis la omaĝo al la kataluna pioniro Delfí Dalmau;la recitalo de Nikolin' ege komplezis kaj la tuttaga ekskurso kun vizit oj al la montaro Montserrat,ĉampankelo Codorniu kaj Muzeo de Esperanto en Sant Pau d'Ordal kronis la programon.Mankis tamen la anoncita filmo,sed ni prezentis anstataŭe tre interesan aŭdvidan projekcion.
Laŭ nia celo la etoso de la Forumo estis vere interesa kaj instrua Oni aŭdis kaj praktikis abunde la lingvon kaj tio estis ne malpli grava aldonaĵo de la aranĝo.Mankas ĉe ni superaj kaj konversaciaj kursoj por ke niaj komencantoj perfektiĝu kaj tiaj okazoj iom kompensas la mankon.

---

Ĉirkaŭ la 10a horo matene la homoj alvenis ĉe la urbodoma placo kaj formis plurajn babilantajn grupojn. Subite aperis la ĝenerala sekretario distribuante la ĵus eldonitan revuon de KEA.kiu enhavis kaj la saluton de Prof.Gastos Waringhien kaj la premiitajn poemojn,kio iomete varmigis la etoson.Post mallonga atendado ni eniris en la Urbodomon kaj supreniris ĝis la Salono de Cento ĉe la unua etaĝo.
Granda homamaso preskaŭ plenigis la salonon,certe pli multaj ol la aliĝintoj al la Forumo.Ni havis la ŝancon saluti gesamideanojn Jean Amouroux el Perpinyà,Frederic Pujulà i Mas kaj edzino (filo de la fama esperantisto Frederic Pujulà i Vallès),Delfí Dalmau i Argemí kaj edzino kaj Ma.Eugènia Dalmau i Argemí kaj edzo (gefiloj de la omaĝato).

Prezidis Ma.Aurèlia Capmany,urbestrara kulturkonsilantino,Jordi Carbonell i Pinyol,prezidanto de KEA kaj Gabriel Mora i Arana,prezidanto de la Floraj Ludoj. Joan R.Guiñón kiel sekretario de la Floraj Ludoj gvidis la ceremonion. Pro la malĉeesto de la festparolanto Prof. Gaston Waringhien,intervenis Perla Ari Martinelli leganta la senkulpigan leteron de nia eminenta dojeno. Sekvis la atendata momento malkovri la ĉefpremiiton per la Natura Floro kiu estis la italo Pier Giorgio Soranzo pro sia poemo "Rendevuo". La laŭreato alvenis al la podio kaj ricevis de la prezidantino kaj la diplomon kaj belan florbukedon. Sekve li legis sian verkon tre patose. Tondra aplaŭdado kronis la mirindan momenton. La sekretario plu anoncis la ceterajn premiitojn (vidu apartan kompletan verdikton). Elstare ni menciu ke la ĉefpremiito ricevis dua aliajn premiojn; ke la pasintjara ĉefpremiito Timothy Brian Carr ricevis tri aliajn premiojn kaj cetere fariĝis Florluda Majstro (Gratulon!); ke nia kara veterano Tomàs Alberich ricevis honoran mencion je la "Premio Artur Domènech i Mas" kaj nia juna aktivulo Carles Berga trafis la Premion "Galanto". Ni gratulas sincere niajn laŭreatajn amikojn.

Estus bone memorigi ke la konkurso "Nova Futuro" celas instigi la praktikadon de la beletro al la komencantoj kaj novaj lernantoj de Esperanto.



Senpaŭze tuj post la ceremonio dela Floraj Ludoj okazis la anoncita omaĝo al nia karmemora Delfí Dalmau i Gener,unu el la kreintoj kaj plej fidela kunbatalanto de Kataluna Esperanto-Federacio (KEF) kiu tre kompetente kaj konvinke strebis por la prestiĝigo kaj rekono de nia kataluneco en la internacia esperantista movado.
Nia Asocio,rekta heredanto de tiu brila KEF,ŝuldis minimuman publikan rekonon al siaj eminentaj antaŭuloj kaj tio inspiris nin pri la taŭgeco de tiaj omaĝoj.
La omaĝon ni antaŭvidis en du klaraj aspektoj.Tiu socia kaj kultura unuflanke kaj tiu esperantista aliflanke.
Pri la unua aspekto en la vivo de la omaĝato alparolis nin Josep Martinez de Foix,prezidanto de la Unesko-Klubo,per bone dokumentita prelego,cetere tre interesa kaj longe aplaŭdata.Pri la esperantista aspekto,prelegis la prezidanto de KEA.Jordi Carbonell i Pinyol per bela informo rilate la fekundan agadon de la omaĝato kiu same provokis finan komplezon kaj aplaŭdadon de la ĉeestantoj.
Kortuŝan surprizon kaŭzis la aŭskultado de la registrita voĉo de la omaĝato,kion ni dankas al la zorgo de nia veterano Tomàs Alberich.
Jen la konciza raporto kiun nia revueto permesas,sed ĝi evidente ne sufiĉas,ĉar la legado de la supra teksto informas pri tio kio okazis,sed tamen diras nenion pri la enhavo de la prelegoj.Ni bezonus specifan eldonaĵon de ambaŭ tekstoj kaj de tiuj premiitaj en la Floraj Ludoj kaj de tiuj en la Forumo.
Finfine ni devus rekrei la suplementojn de la unua tempo de KEA.Sed ĉu ekzistas preta kompilanto,buĝeto kaj legantaro? Verŝajne la reala bezono ne ekzistas,simple temas pri nova revo de la Plenumkomitato.Tamen se la esperantistoj reagus kaj interesiĝus la projekto eble ekmarŝus. Ni atendu kaj esperu !

# verdikto

PREMIO "NATURA FLORO": RENDEVUO de Pier Giorgio Soranzo
PREMIO "ROZO" (en egaleco): RENDEVUO de Pier Giorgio Soranzo
KVAZAŬ EN MIRAĜ' MAGIA de Pier G.Soranzo
Honora Mencio: ADORO de Timothy Brian Carr

PREMIO "EGLANTERIO"(en egaleco):
LUMO de Albert Goodheir
PRINTEMPO-TRIPTIKO de Timothy Brian Carr

PREMIO "VIOLO": ne aljuĝita
Honora Mencio : FIDO NOVA de Timothy Brian Carr

PREMIO"FREDERIC PUJULÀ I VALLÈS": ne aljuĝita
Honora Mencio (en egaleco): NIMFEO de V.A.Glazunov
BRILA SORTO de Stefa Kalimenova

PREMIO "AMARANTO": ne aljuĝita

PREMIO "JAUME GRAU I CASAS":ne aljuĝita

PREMIO"ARTUR DOMÈNECH I MAS": ne aljuĝita
Honora Mencio: LA PRIMERA MENTIDA,tradukita de Tomàs Alberich i Jofré el "La unua mensogo", originale verkita en esperanto de Ladislav Tihanyi.

PREMIO "GALANTO": GEORGO KAJ LA PSEŬDO-SI de Carles Berga i Molina

la 30an de oktobro 1988a

Gabriel Mora i Arana
Prezidanto

Joan Ramon Guiñón i Roset
Sekretario



# ASEMBLEO

Skize ni informas ke la Asembleo okazis kiel antaŭvidite la 1an de novembro en la prelegejo de Unesko-Klubo, tuj post la fermo de la 7a Internacia Literatura Forumo. Kun pli ol 30 partoprenantoj, ĝi disvolviĝis glate laŭ la tagordo. Sinsekvis la diversaj legadoj de antaŭa protokolo, sekretaria raporto kaj bilanco kaj raporto de la kontrola komisiono.
Post kelkminuta paŭzo sekvis la legado kaj de la agadplano kaj buĝeto por 1989.
Informojn pri Grupoj kaj Fakoj prezentis Gemma Armadans (KEJ); Miquel Vilagran (Unesko); Ricard S.Güell (Firma Tero) kaj Joan R.Guiñón (Koop.Literatura Foiro).
Por 3 vakantaj postenoj, aprobiĝis nur la kandidatiĝo de Oscar Puig kaj la Asembleo rajtigis la Plenum komitaton serĉi la ceterajn.
En la lasta punkto intervenis Ricard S.Güell, Joan R.Guiñón, Manuel Casanoves kaj Jordi Carbonell (nome de la Grupo de St.Pau d'Ordal).
Restas kelkaj ekzempleroj de la Asemblea dokumentaro, kiujn ni volonte sendos al la unuaj petantoj.

La agadplano proponita dum la Asembleo prezentas tre simplan skemon pri la venontjara agado, laŭ jena resumo:
Elstaras la aranĝoj kun Kongreso, unu Seminario kaj 2 aŭ 3 intergrupaj renkontiĝoj kaj tiuj lastaj prefere en lokoj kie lastatempe aperis novaj Grupoj.
Oni insistas pri la efiko de la revuo pro ĝia regula aperado kaj la ebleco starigi abono-servon.
La Koresponda Kurso de KEA.fariĝas pli kaj pli interesa ĉefe pro ĝia varbada celo kaj oni rekomendas ĝin forte evoluigi.
Ankaŭ ege evoluinda estas la Libroservo kiu devas ne nur librojn distribui (aŭdvida materialo nepras)
Kaj ĉu estas tempo paroli pri propraj eldonoj? Urĝas vortaro, konvenas diverstemaj suplementoj, nepras presita instrumetodo. Verŝajne estas tempo pri tio, sed ĉu ni sukcesos atingi sufiĉajn kunlaboron kaj monrimedojn?
Sendube multaj aliaj sugestoj indus aldoniĝi al nia agadplano kaj ni invitas la membrojn sendi ilin.
Ne timu proponi eĉ frenezetajn sugestojn kaj eĉ skribi al ni katalune. Antaŭen!

# DIALOGU KUN LA KASISTO!

La Plenumkomitato invitas la membrojn de KEA dialogi kun la kasisto ĉar li elĉerpiĝis pri malespera monologo ĝis nun, liajn alvokojn vi povas relegi en antaŭaj revuoj.
Li bezonas kalkuli pri la enspezado de la kotizoj en difinita tempo ĉar li devas kovri la antaŭviditajn elspezojn de la buĝeto aprobita en Asembleo.
Li proponas la plej facilan solvon, kia estas la enspezado trabanke, kaj pri tio la membroj devas rajtigi la Asocion. Ĝis nun ankoraŭ ne la duono de la membraro elektis ĉi tiun solvon kaj pri la ceteraj tre malmultaj proprainiciate sendas la kotizon tuj ĉe la jarkomenco per ĉeko aŭ poŝtĝire.
Sed sufiĉe granda nombro da membroj elektis neniun solvon kaj al ili ni proponas la dialogon kun la kasisto.
Kiel vi deziras pagi vian kotizon? Bonvolu nepre respondi la demandon al nia kasisto. Vi povas tion fari skribe aŭ telefone rekte al nia sekretariejo en Sabadell ĉiu labortago vespere ekde la 20a ĝis la 22a horo.
Se vi intertempe decidis tamen pagi trabanke, bonvolu plenigila ĉi-kunan bankrajtigilon, kiun li refoje sendas al vi.
Se vi sincere deziras ke nia movado progresu, nepre tuj reagu al la alvoko de la kasisto.

# KUNLABORAĴOJ

Antaŭ kelkaj semajnoj mi havis agrablan interparoladon kun samideano,kiu rakontis pri la sukcesaj ekspozicio kaj prelego pri Esperanto okazintaj en gimnazio de lia urbo.Tagoj poste,la tiea bibliotekistino diris al li,kiel multaj geknaboj venis al ŝi por peti esperantajn aŭ pri-esperantajn librojn.Tamen,tiu biblioteko posedas bedaŭrinde nur unu aŭ du vortaretojn.

Mi bone imagas la seniluziiĝon de tiuj scivolemaj gejunuloj kiam ili ne povis propraokule konstati,kion oni diris al ili,t.e. ke Esperanto estas facile komprenebla,ke ekzistas riĉa kaj altkvalita literaturo,k.t.p.

Kaj tiu interparolado ja okazis dum vizito en la Muzeo de Esperanto en Sant Pau d'Ordal,prestiĝa institucio por nia movado,kiu tre bone montras la gravecon de nia literaturo per sia multnombrega kolekto da libroj,originalak kaj tradukitaj.Mi eĉ rimarkis,ke estas pli ol unu ekzemplero el multaj verkoj.Kaj do mi pensis: al kiu utilas havi librojn,kiuj neniam estos legataj ? Ĉu al la uzantoj de la Muzeo ne sufiĉas nur po unu ekzemplero el ĉiuj ?

Ni ne estas riĉaj.Ni devas profiti je maksimumo de tio,kion ni havas.Eble ankaŭ kelkaj el ni havas Esperanto-librojn, kiujn ne ŝatas aŭ ne plu legos.Al kiu ili utilas?

Kial ne kolekti tiujn superfluajn librojn kaj krei specon de "fluganta" esperanta libro-fonduso? Vilaĝaj bibliotekoj estas por multaj,precipe geknaboj,kulturaj simboloj.Se nia movado volas esti rigardata kiel kultura afero,ĝi devas eniri en ilin Tiujn librojn ni povus pruntedoni al biblioteko dum kelkaj monatoj,des pli bone se tio okazas samtempe de informa kampanjo pri nia lingvo en la koncerna vilaĝo aŭ ekesto de kurso.Tiumaniere,aliaj gejunuloj kiel la de nia samideano priskribitaj,trovus ne nur informon,sed ankaŭ okazon eklerni la lingvon praktike.

Kaj aldonu al tiu fonduso ne nur gramatikojn,vortarojn aŭ "seriozajn" verkojn, sed ankaŭ revuojn kaj ekzemplerojn de Asteriks kaj Tinĉjo,kaj la sukceso estos certa.

Ĉu ne?

P.M.Martin Burutxaga

-ESPERANTA KURIOZAĴO-

AMPLEKSO DE LA KAPVORTOJ EN PIV
(2a eldono ofseta 1977)

Kiam ni amikiĝas kun vortaro,ĉiam estas pretaj priserĉadi ĝin.Per seriozaj traserĉoj sciencistoj povas antaŭenigi lingvon.Sed kiel labori ĉiam neriproĉinde? Unu el la vantaj plezuroj de tiu ĉi mondo (lingva) estas ludanalizi supraĵan aspekton.

Iun tagon iu organizis konkuradon inter la esperantaj radikoj.Kiu el ili estas plej impona? Al kiuj kapvortoj la PIV-aŭtoroj koncedis amplekson minumume unupaĝan?

(Por faciligi la poentadon oni aljuĝis la ciferon 2 al la kapvortoj okupantaj unu paĝon (=du kolumnojn,proksimume 5.500 literspacojn).

Jen la por kelkaj PIV-uzantoj surprizaj rezultoj: (rimarku,ekzemple,ke la plej ofta vorto,la artikolo,ampleksas nur kolumno-kvaronon (=0,25)oni povas facile klarigi tion,sed ni ludas,ni ne science esploras,permesu al ni ludi!


| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1. | ir/i | proks. | 6'25 | kolumnoj |
| 2. | ten/i | " | 5'35 | " |
| 3. | -ig/ | " | 4'70 | " |
| 4. | tir/i | " | 3'80 | " |
| 5. | fort/a | " | 3'75 | " |
| 6. | form/o | " | 3'50 | " |
| 7. | skrib/i | " | 3'45 | " |
| 8. | viv/i | " | 3'40 | " |
| 9. | met/i | " | 3'35 | " |
| . | vid/i | | | |
| 11. | ven/i | " | 3'30 | " |
| 12. | liber/a | " | 3'25 | " |
| 13. | fal/i | " | 3'20 | " |
| | -iĝ/ | | | |
| 15. | lev/i | " | 3'15 | " |
| | lum/i | | | |
| 17. | kovr/i | " | 3'10 | " |
| | labor/i | | | |
| 19. | ter/o | " | 3 | " |
| 20. | ĵet/i | " | 2'95 | " |
| 21. | temp/o | " | 2'90 | " |
| 22. | kalkul/i | " | 2'75 | " |
| . | varm/a | | | |
| 24. | kun | " | 2'70 | " |
| | unu | | | |

26. kon/i " 2'65 "
las/i
parol/i
29. far/i " 2'60 "
mult/a
turn/i
32. don/i " 2'50 "
flu/i
hav/i
pas/i
pren/i
sent/i
38.lig/i " 2'40 "
rømp/i
40.port/i " 2'35 "
serv/i
star/i
trov/i
valor/i
45.flug/i " 2'30 "
46.bat/i " 2'25 "
bel/a
bon/a
de
50.ord/o " 2'20 "
prem/i
sign/o
tim/i
54.kap/o " 2'15 "
kapt/i
lud/i
nom/o
pez/i
puŝ/i
sci/i
ŝton/o
tuŝ/i
voj/o
64.al " 2'10 "
antaŭ
ĉe
est/i
tag/o
69.man/o " 2'05 "
nov/a
plen/a
radi/o
73.am/i " 2 "
gard/i
klin/i
konduk/i
kur/i
rigard/i
79.vort/o

El 79 kapvortoj,52 estas verbaj radikoj, 12 estas substantivoj,7 adjektivoj,5 prepozicioj,2 verbaj sufiksoj kaj 1 numeralo.

KARBERO KERNO

## KRUCVORTENIGMO



HORIZONTALE

1.-Lernoĉambro(10)-2.-Diri"ne" (3) Prepozicio (2)-3.-Lertec'(3) Krea ago (6)-4.-"__ televidilo" (2) Grup' da homoj kiuj kantas kune (3) Vaz' por kuirado (3)-5.-Du kaj nulo(3)-6.-Homo kiu luas (6)-7.-Malagrabla sensacio (6)-8.-Monato(5)-9.-Rutenio(2) Io,kion mi nun vidas antaŭ mi (3)-10.-Aĵo (7) Receptakl' (2).

VERTIKALE

1.- Virinetoj (8)-2.-Kion oni faras en H1 (5) Vilaĝ'(3)-3.-(inverse)Mortadelo kaj Filemon'laboras por ĝi(3)-(inverse)juna homo (6)-5.-Sukeremuloj tre ŝatas ĝin(8)-6.-Du konsonantoj egalaj(2)-N (2)Bonvolu turni(2) 7.-(inverse)granda en vertikalala direkto (4)-8.-Hispana dekstra partio(2)-Du vokaloj egalaj(2)-9.-Aŭtomobiloj havaskvin el ili (5) Nedifina pronomo(2)-10.-Kataluna urbo (4)-Hejmbestoj,kies inoj liveras lakton(5)

Ni lotumos jarabonon al la revuo KONTAKTO inter la ĝustaj solvintoj de ĉi tiu krucvortenigmo.Tre rekomendinda ludo por praktiki la lingvon. Nepre partoprenu!